



## Mark Fettes elektita kiel nova prezidanto de UEA

Gazetara Komuniko de UEA n-ro 506

Prof. d-ro Mark Fettes el Kanado estis elektita kiel la nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio en la unua kunsido de la Komitato en Rejkjaviko sabaton, la 20-an de julio. Fettes transprenas la prezidan stafeton de Probal Dasgupta, kiu gvidis la Asocio dum du oficperiodoj ekde 2007.

La kunsidon partoprenis 44 komitatanoj aŭ iliaj anstataŭantoj kaj 2 observantoj. Komence ĉeestis nur la komitatanoj A kaj B, kiuj alektis al la supera organo de la Asocio kvin komitatanojn C. Elektitaj estis Zsófia Kóródy (35 voĉoj), Julián Hernández Angulo (30), Jean Codjo kaj Stefano Keller (po 24), kaj Orlando E. Raola (21). Ne elektiĝis Marcel Delforge kaj Josep Franquesa Solé (po 17), kaj Johan Derks (9).

Poste la Komitato diskutis pri la nombro de elektotaj estraranoj kaj aŭdis sinprezentojn de la kandidatoj. Per plimulto de voĉoj oni akceptis la proponon de la Elekta Komisiono, ke la Estraro konsistu el sep membroj. Origine estis dek kandidatoj, el kiuj Johan Derks forfalis pro sia neelekto kiel komitatano. En la voĉdonado sukcesis Mark Fettes (43 voĉoj), Stefan MacGill (37), José Antonio Vergara (35), Lee Jung-kee (34), Martin Schäffer (33), Stefano

Keller (30), kaj Barbara Pietrzak (24). Krome, Orlando Raola ricevis 23 kaj Amri Wandel 21 voĉojn.

La Estraro estas preskaŭ tute nova: nur Stefano Keller kaj Barbara Pietrzak membris ankaŭ dum la antaŭa oficperiodo. Du novelektitoj havas tamen antaŭan sperton pri la laboro en la Estraro: Mark Fettes estis ĝia membro 1992-1998 kaj José Antonio Vergara 2007-2010. La nova Estraro ekoficos lundon, la 22-an de julio, post la akcepto de la Estrara Raporto pri la jaro 2012. Tuj post sia elekto ĝi tamen jam havis mallongan kunsidon por fari proponon al la Komitato pri la prezidanto, la vicprezidanto kaj la ĝenerala sekretario: respektive Mark Fettes, Stefan MacGill kaj Martin Schäffer. Tiun proponon la Komitato akceptis unuanime. Pri la cetera taskodivido la nova Estraro decidis poste dum la kongresa semajno.

En la unua kunsido de la Komitato prezidis Probal Dasgupta – krom ĉe la elektado de komitatanoj C kaj estraranoj, kiam prezidis la kunordiganto de la Elekta Komisiono, d-ro Ulrich Lins.

La Komitato elektis ankaŭ tri novajn Honorajn Membrojn de UEA: Roland Lindblom el Svedio, Biruta Rozenfelde el Latvio, kaj Hallgrimur Sæmundsson el Islando, kiu malfeliĉe forpasis unu monaton antaŭ la UK.

### Ĉu estas eraro...

...en via nomo aŭ adreso en la listo de kongresanoj en la Kongresa Libro. Se jes, bonvolu raporti ĝin al la CO tiel ke viaj datenoj povu esti korektitaj. Dankon.

### Temas pri Manŭel

La artista nomo de Emanuele Rovere, kiu koncertos en ĵaŭdo de 15h30 ĝis 16h30 en salono Lapenna, estas "Manŭel". Vi maltrafis tiun nomon sur paĝo 58 de la Kongresa Libro kaj en ĝiaj programaj paĝoj, sed vi ne maltrafis ĝin nun!

### Kio estas aikido?

Se paroloj iom plu pri la Kongresa Libro: eĉ post la klarigoj pri AIKIDO sur paĝo 56, vi verŝajne ankoraŭ ne bone scias precize kio tio estas – krom se vi jam antaŭe havis sperton pri ĝi, kompreneble. Ĉiuokaze parolos pri la temo Mireille Grosjean (KN 270), ĵaŭdon 12h45-13h45 en salono Beleva. Krom esti mem "nigra zono" de aikido, ŝi detale esploris en Japanio pri la interesaj rilatoj inter ĝi, Oomoto kaj Esperanto. Venu kaj sciu pli bone.

# Tago de la Lernejo

mardo la 23-a de julio 2013,  
11h00-16h00, salono Bormann

## Temo:

### Edukado por justa komunikado

- 11h00 **Salutoj**  
Prezidantoj de UEA kaj ILEI
- 11h15 **Edukaj perspektivoj en la Strategia Vizio**  
*Stefan MacGill* (Hungario)
- 11h35 **Kio estas justa komunikado?**  
*Mireille Grosjean* (Svislando)
- 12h00 **Ĉu egalajn rajtojn kaj eblojn por ĉiuj je ekzameniĝo pri Esperanto?**  
*Katalin Kovats* (Nederlando)
- 12h20 **Aldone al Stano Marček: instruado per projekciaĵoj**  
*Anna Lowenstein* (Italio)
- 12h40 *Zsófia Kóródy* (Germanio) **Per eŭropaj projektoj por justa komunikado**
- 13h05 **Notetoj pri la ĉefa temo el la vidpunkto de la Nitobe-simpozio**  
*Otto Prytz* (Norvegio)
- 13h25 Paŭzo
- 13h40 **Lingva situacio en bruselaj lernejoj**  
*Kristin Tytgat* (Belgio)
- 14h00 **Esperanto-urbo Herzberg am Harz – loko de multnacia, multkultura loĝantaro**  
*Peter Zilvar* (Germanio)
- 14h20 **“Strategia” kaj praktika plano, por informi pri Esperanto en la lernejojn, laŭ la ĝisnunaj kaj estontaj eblecoj de la francaj edukaj programoj**  
*Michel Dechy* (Francio)
- 14h40 **Lernado de Esperanto en mara afrika ĉefurbo**  
*Paola Birgit Giommoni* (Italio)
- 15h00 **“Avantaĝo” de E-instruado: en EU-parlamento jam antaŭ deko da jaroj**  
*Marija Belošević* (Kroatio)
- 15h20 **Infektaj malsanoj en nia lingvouzo**  
*Rob Moerbeek* (Nederlando)
- 15h40 **Ferma diskuto**
- 16h00 **Eliro**

## Grava atentigo pri ekskursoj

Ni memorigas la partoprenantojn de la ekskursoj ke iliaj ekiraj horoj estas tiuj notitaj sur la biletoj. Kiel notita sur paĝo 11 de la Dua Bulteno, kaze de malsamaj ekiraj horoj inter tiuj notitaj sur la biletoj kaj tiuj en la Dua Bulteno, ĉiam validas la horoj sur la biletoj.

## Ateistoj invitas

ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo) gastigos eksteran parolanton ĉe sia publika kunveno: tiu estos Hope Knútsson, fondinto kaj prezidanto de Siðmennt, Islanda Etika Humanisma Asocio. Dum la kunveno ŝi prezentos la laboron de Siðmennt, kaj precipe ĝian tre sukcesan programon de laikaj konfirmacioj. La kunveno kun Hope okazos mardon, 15h30-16h45 en salono Broadribb. Interesatoj bonvolu alveni pli frue, je la 15h00, por ĉeesti ankaŭ la administran parton de la programo.

**Anna Lowenstein, KN 413**

## Alia invito

TADEN (nefumantoj) bonvenigas vin al sia kunsido, mardon je la 16h15 en salono Lapenna. Bonvolu cetere noti ke ĝia retpoŝta adreso ŝanĝiĝis: vidu tiun kiu aperis en Jarlibro 2013. Ĝi nun estas: <moerbeekr@gmail.com>.

**Rob Moerbeek, KN 51**

## Alia neekzistanta E-litero

Ralph Schmeits skribas el la CO de UEA, leginte la unuan numeron de *Aŭroro*, ke li atendus, ĉe la anonco pri la nova konkurso por “Foto de la Tago” (vidu, denove, [http://www.flickr.com/groups/98-a\\_uk](http://www.flickr.com/groups/98-a_uk), cetere pardonu ke gajninta foto ne aperis jam hodiaŭ), “yahoo-konton” aŭ “jahu-konton”, sed ne “yahu-konton”. Prave. Li tamen fine vidis tion kiel aŭguron pri la Q sur la lasta paĝo. Ni provos eviti ke ankaŭ W kaj X enŝteliĝu en la restantaj numeroj de la Kuriero.

## Kunveno de la fervojistoj

Dimanĉon je la 15-a horo okazis kontaktkunveno de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio). Dek kvin homoj el ok landoj ĉeestis. La vicprezidantino, s-ino Sylviane Lafargue, post salutvortoj nome de la prezidantino s-ino Rodica Todor, bonvenigis la partoprenantojn kaj raportis pri la lasta IFEF-kongreso, okazinta en Francio en majo 2013. Post klarigoj pri la venonta kongreso en San Benedetto del Tronto (Italio), komenciĝis diskuto pri manieroj plibonigi kontaktojn kun fervojistoj kaj gejunuloj.

**Sylviane Lafargue, KN 828**

## Marda IKU-prelega interŝanĝo

En mardo, la 23-a de julio, la IKU-prelego 6, de Geoffrey Greatrex, okazos 10h45-11h45. La IKU-prelego 5, de Jouko Lindstedt, okazos 17h00-18h00. Ambaŭ estos en salono Hirsch.

## UEA-prezidinto festas

Grégoire Maertens el Belgio, KN 10 kaj iama prezidanto de UEA, ne ĉeestas la UK-on, kvankam li havas tre bonajn memorojn pri la antaŭa islanda UK. Preskaŭ samtempe kun la Solena Inaŭguro, li kaj lia edzino estis festantaj la 65-an datrevenon de sia geedziĝo. Gratulon al ili!

**Roland Rotsaert, KN 131**

## Ne nur en Kopenhago li UK-poemetas

*Same kiel la atingoj*

*Fare brave de l'vikingoj,*

*Venis ni al Rejkjaviko,*

*Dank' al nia Ludoviko!*

**Ŝin Kiro, anonima kongresano**

## Novaj aliĝoj

- 1013 **S-ino Chantal Latapie**, Francio
- 1014 **S-ro Michael Cwik**, Belgio
- 1015 **S-ro Mathew Rankin**, Kanado
- 1016 **S-ro Kimio Nishimori**, Japanio
- 1017 **S-ino Shiqueco Takahashi**, Brazilo
- 1018 **S-ro Luiz Fernando Puhl**, Brazilo
- 1019 **S-ro Hiroshi Ashikari**, Japanio
- 1020 **S-ino Suzanne Roy**, Kanado
- 1021 **S-ro Carlo Masella**, Italio
- 1022 **S-ro Masanori Fukuda**, Japanio
- 1023 **S-ino Natalia Celaritskaja**, Rusio
- 1024 **S-ro Kim J. Henriksen**, Danio
- 1025 **S-ino Barbara Brandenburg**, Rusio
- 1026 **S-ino Elizabeth Stanley**, Britio
- 1027 **S-ino Rosemary Stanley**, Luksemburgo
- 1028 **S-ro Gerrit Berveling**, Nederlando
- 1029 **S-ino Madzy van der Kooij**, Nederlando
- 1030 **S-ino Gunborg Stenström**, Svedio
- 1031 **S-ino Edith Marianne Borchert**, Germanio
- 1032 **S-ino Erin Piatieski**, Usono
- 1033 **S-ino Elza Fernandes Pereira**, Brazilo
- 1034 **S-ino Sigrid Sjöstrand**, Finland

## MESAĜO DE LOUIS C. ZALESKI-ZAMENHOF AL LA 98-A UK EN REJKJAVIKO

*Estimata Sinjoro Prezidanto;*

*Estimataj Honoraj Gastoj,*

*Estmataj kaj karaj Geamikoj,*

alvenintaj kongresi en Islando, tiu belega kaj varma insulo, eĉ se ĝia nomo signifas “insulo de glacio”! Ĉu tien alveninte vi sentas vin izolitaj? Ĉu “insulo” daŭre signifas “izolecon”? Certe, la etimologio de tiuj du vortoj ŝajnas simila; ankoraŭ pli simila en naciaj lingvoj, ekzemple en la itala, en kiu insulo estas “isola”.


Fakte, historie, la insulanoj ĝuis – aŭ suferis – sian izolecon. Tamen, hodiaŭ tio ne plu estas vero. Alveninte al Rejkjaviko el proksimaj kaj malproksimaj kontinentoj aŭ el aliaj insuloj, laŭ maro aŭ tra aero, vi ne plu sentis, ke insulo signifus izolecon. Ĝuste, la maro ne plu dividas, sed ligas insulojn inter si kaj ligas ilin al kontinentoj; transportoj plej ampleksaj pli facile trafluas marojn ol vojaĝus laŭ tero. Kreskas tra la maro pontoj longaj de multaj kilometroj, aperas submaraj tuneloj. Krome oni kreas hodiaŭ sur la marfundo konstruaĵojn pli larĝajn kaj pli altajn ol ie ajn sur la tero; tial maro inter insuloj ne plu similas al dezerto!

Finfine, vi venis kongresi sur insulo ne por izoliĝi, sed por substreki proksimecon inter vi ĉiuj, proksimecon, kiu, sekve al niaj ideoj, kreas inter ni unu grandan rondon familian.

LOUIS C. ZALESKI-ZAMENHOF

## Aŭtoraj Duonhoroj (en la libroservo, salono Laŭlum)

### Paul Gubbins



Tomatojn kaj ovojn putriĝintajn atendas Paul Gubbins (KN 309) dum sia aŭtora duonhoru. Evidente... ĉar li prezentos i.a. nur duone Esperantan libron. Misilojn mucidajn do li meritas... aŭ ĉu? Lia dulingva angla/Esperanta antologio

*Star in a Night Sky* (Stelo en nokta ĉielo) servas ne nur kiel baza legolibro sed ankaŭ kiel propagandilo por la internacia lingvo. Paul – ĉefredaktoro de *Monato*, dramverkisto, kaj membro de la Akademio de Esperanto – parolos pri la genezo de la antologio kaj pri la paŝoj al ties realigo.

Mardo 10h30-11h00

### Michela Lipari: Itala duonhoru



*Eugenio Montale kaj aliaj liguriaj aŭtoroj*. Itala Esperanto-Federacio decidis pasintjare eldoni esperantlingvan antologion de italaj verkistoj de la regiono en kiu ĝi kongresas. Pro tio pasintjare aperis la antologio *Luigi Pirandello kaj aliaj siciliaj aŭtoroj*. Ĉi-jare la itala kongreso okazos apud

Sanremo, en la regiono Liguria, kaj Carlo Minnaja kunlabore kun aliaj konataj italaj esperantistoj kunmetis tiun ĉi novan kolekton, ekde la Nobel-premiito Eugenio Montale, tra la prozisto Italo Calvino, ĝis la plej fama kanzonisto Fabrizio De Andrè.

*Gabriele D'Annunzio – Antologio*. Ĉi-jare en Italio oni diversloke memorigas pri la centjariĝo de la naskiĝo de tiu ĉi fama verkisto. Akceptante defion de la esperantistoj el Pescara (naskiĝurbo de la poeto) Carlo Minnaja sukcesis kunmeti antologion kun tradukoj kiuj revuas la poezian, prozan kaj teatran talenton de tiu malfacila itala personeco.

*La Projekto* de M. Miconi, trad. D. Astori. Juna studento renkontiĝas iun tagon kun stranga personeco kaj iom post iom kaptiĝas en misteran kaj fascinoplenan mondon. Ĉu sonĝo, koŝmaro aŭ realo?

Kial mi ilin prezentas? Mi kunlaboris diversmaniere al la realigo de ĉiuj, per tradukado, kontrolado de presprovaĵoj, redaktado k.a.

Mardo 16h00-16h30

## Probal Dasgupta, Spomenka Ŝtimec k.a.: La mirinda aventuro de kroata infanlibro



En la jaro 2005 Probal Dasgupta ekkunlaboris kun Kroata Esperanto-Ligo pri tradukprojekto de kroata infanlibro. La projekto vivas ĝis hodiaŭ: kuraĝigite de la laboro de Probal, post Hinda Unio, pluraj aziaj landoj aliĝis al la projekto: en 2013 ankaŭ Sud-Koreio aliĝis, post Japanio, Irano, Ĉinio kaj Vjetnamio. Ĉi-jare en la korea urbo Pusan aperis la korea traduko de la sama libro, *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapic*, prizorgita de la tradukisto, Ombro (JANG Jeong-Ryeol). Per tiu ĉi projekto unu kroata infanlibro estis tradukita al ses aziaj lingvoj kaj tiel per Esperanto fariĝis teorie alirebla por du miliardoj da homoj. En la historio de nia kulturo, ne ekzistis simile ampleksa projekto en kiu Azio per Esperanto kiel lingva ponto ligiĝas al Eŭropo en la kampo de infanliteraturo. Spomenka Ŝtimec prezentos la tradukprojekton ĉe kies pinto staris Probal Dasgupta. En la prezento kuniĝos pluraj kunlaborantoj el Azio.



Mardo 16h45-17h15

### Pli ol cent ĉeestis Ekumenan Diservon

Tradicia dimanĉa evento, la Ekumena Diservo ĉi-jare altiris pli ol cent kristanojn, sed ne nur ilin: por la unua fojo aliĝis ankaŭ bahaanoj. Post saluto de la direktoro de la katedralo, la servon gvidis nome de IKUE pastro Bernard Einchkorn kaj nome de KELI pastoro Gerrit Berveling, kiu predikis. Kiel bazo estis prenitaj tekstoj el la libreto por la Preĝsemajno por unueco de kristanoj, ĝuste pri la konstruo de la Babel-turo. La ĉeestintoj estis vokataj pripensi jenajn demandojn: Kie, ene de la pluraj diferencoj kiuj disigas nin, ni praktikas veran konversacion? Ĉu nia konversacio estas direktita al iu granda projekto de nia propra intereso, aŭ al la nova vivo kiu alportas esperon? Kun kiuj homoj ni konversacias kaj kiu ne estas inkludigita en niaj konversacioj? Kial?

Marija Beloŝević, KN 995

### Raportu vi!

Bv. liveri kontribuojn por *Aŭroro* ĉe la UEA-giĉeto, venigi al la Kuriera ĉambro sur la 4-a nivelo, aŭ sendi al <roymccoy.nl@gmail.com>. Dankon kaj ĝis.

